



AMERIKA



ESPERANTISTO

E



OF CLASSIC

Oct.-Nov., 1924

LIBRARY
OF THE
UNIVERSITY
OF CALIFORNIA

	Page
Dr. Lowell's International Broadcast	1
Kion Esperanto Signifas al Mi	D. O. S. Lowell 2
What Esperanto Means to Me	D. O. S. Lowell 3
Recenzoj	6
Oomoto	8
Radio	9
Kuragigileto	H. B. Hastings 11
"Write Internationally"	Herbert M. Scott 12
"Skribu Internacie"	Herbert M. Scott 13
News and Notes from the Central Office	E. J. Meriam 14
Krucvorta Enigmo	16

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN OF

THE ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta Rondo.—L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Meets first Tuesday evenings, Rooms 309-311 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secretary, 1160 Fell Street.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association: Meets each Monday evening at 8 in Room 25, 747 St. Catherine St., West, Sek. G. E. Warner.

OKLAHOMA CITY, OKLA.

La Oklahoma Esperantista Societo kunvenas dimanĉe kun Arto kaj Scienco Klubo, 2501 W. Ave. "G", RR6, Box 156, Oklahoma, Okla. C. R. D. S. Oakford, Prez.

WASHINGTON, D. C.

Kolumbia Esperanto-Asocio, third Thursday October to May; Kabea Klubo, other Thursdays throughout the year, at 8 P. M. Class, Thursday, at 7.30. All at 1918 Sunderland Place.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ciumonate.

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 1217 7th Ave.

BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society.—Mrs. E. C. Flint, Secretary, 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M.—9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—\$1.00.

TOPEKA, KANSAS Esperanto Association. Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-ino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-ino, F-ino Leone Newell, 635 Watson St.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoepler, Sec., 63 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silberrick, 229 East 18th St., Manhattan.

WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

CLEVELAND, OHIO.

The Cleveland Esperanto Society, Hotel Winton, every Monday, 8.00 P. M. S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Society meets every Sunday at 4 P. M., and classes are held every Thursday at 8 P. M., in the school room of the Society of Friends, 113 Maitland Street.

Honorary Secretary, S-ro. A. P. H. Rollason, Box 123, Terminal A, Toronto.

PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y, West Phila. High School for Boys. Barĉo and monthly meetings on third Tuesdays at Hotel Hanover, 12th and Arch Sts. (Barĉo 6.45; business meeting 7.45 P. M.) Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.)

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanto Stelo de Polujo.—Sekr., S. Zysk. Kunvenasardon vespere inter 8-10 h., 509 N. York Ave.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

ST. PETERSBURG, FLORIDA.

Amikeco Rondo meets Tuesdays 4.00 P. M., Fridays 8.00 P. M. E. E. Owen-Flint, Sec. 211 7th Ave. North.

Amerika Esperantisto

ORGANO

de la

ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO

507 Pierce Bldg., Copley Square

Boston 17, Mass., U. S. A.

Vol. 33.

October-November, 1924.

No. 5.

DR. LOWELL'S INTERNATIONAL BROADCAST

(November 25, 1924, from WBZ, Boston)

Gesamideanoj de Esperantujo:

Mi ne povas vidi vin, kaj mi multe miras kiom el vi nun aŭdas kaj komprenas min, aŭ en Massachusetts, aŭ en Usono, aŭ en Norda Ameriko, aŭ en ia ajn alia lando de la mondo. Al ĉiuj el vi kiuj kaj aŭdas kaj komprenas, mi etendas miajn fervoraj: bondezirojn kaj tre sincerajn salutojn.

Mia nomo estas **Lowell**; mi silabas ĝin; Lo, O, Ŭo, E, Lo, Lo. Mi sendas tiun ĉi depeŝon per radio de Ŭo Bo Zo (WBZ), Bostono, tri cent tridek sep metroj, la stacio de la Herald-Traveler.

Mi insiste petas ke vi nepre kaj nun sendu leteron al la **Boston Herald**, aŭ Angle aŭ Esperante, dirante kie vi loĝas (speciale se en malproksima Stato, aŭ en fremda lando), ke vi klare aŭdis kaj facile komprenis tiun ĉi saluton, kaj ke Esperanto vere taŭgas kiel bona radi-ilo.

Bonvolu ne prokrasti tiun ĉi gravan devon, pensante ke alia persono sendube skribos. Ne diru, malenergie kaj mallaboreme, "Georgo faru ĝin!" (Let George do it!). Faru ĝin vi mem; faru ĝin baldaŭ; faru ĝin **tuj**—hodiaŭ vespere. Kaj se vi tiamaniere faros vian devon pro nia kara lingvo, mi multe esperas kaj certe kredas ke jaŭdon proksiman (Nov. 27) vi manĝos vian bongustan grasan meleagraron pace kaj kontentplene.

Vivu Esperanto! Bonan nokton!

KION ESPERANTO SIGNIFAS AL MI

(La lasta el tiaj artikoloj kiun ni nuntempe eldonos en tiu ĉi ĵurnalo. Sed ni proponas eldoni en aparta folieto la serion, kune kun aliaj ĝis nun ne presitaj, kaj ĉiuj, laŭokaze tradukitaj esperanten. Ĉu vi mendos kopion?)

Kiam oni ekatentigis min al Esperanto, mi estis allogata per ĝia simpleco, ĝia noveco, kaj la mirinda genio de ĝia elpensinto. Nature mi trovis ekzemplojn kiujn mi povus plibonfari aŭ mi opiniis tion, ĝis kiam mi jam sciis plimulte pli la afero. Kiam mi trovis tiajn neperfektaĵojn, simile al Kapitano Cuttle (Elp. Kut'l) mi faris noton pri ili, sed ho! mi ja trovis, kiel mi progresis, ke Zamenhof estis pli saĝa ol mi, kaj jam antaŭvidis miajn malfacilaĵojn kaj prizorgis ilin, alivorte li estis konstruinta pli bone ol mi imagis. Tial unu post unu miaj kritikaĵoj sin trovis en la fuŝkorbo. En Esperanto, kiel en aliaj fakoj—

“Estas danĝera sciadeto via.

Ne gustu aŭ eltrinku el la fonto Pieria.”

Baldaŭ mi komencis havi la studeman intereson por la lingvo. Mi ne povis trovi Esperantan instruiston, sed mi aĉetis kelkajn komencajn librojn kiuj bone taŭgis ĝis kiam mi povis legi simplan prozon. Mi abonis dulingvan ĵurnalon—Esperantan kaj francan—kaj studadis la Esperantan lingvon per la franca traduko en paralela duonpaĝo. Unu tagon mi tralegis la dekstran (francan) duonon el unu paĝo, kaj turnante al la sekva paĝo komencis, senpripense, je la maldekstra (Esperanta) duono. Mi legis multajn liniojn antaŭ ol mi rimarkis ke mi ne legis france. Tio kuraĝigis min. Mi abonis aliajn dulingvajn ĵurnalojn, iujn en lingvoj pri kiuj mi sciis tre malmulte, kaj havis la novan sperton en la studado per Esperanto.

Mi trovis la adresojn de kelkaj Esperantistoj el diversaj landoj kiuj volis korespondi per la nova lingvo, kaj skribis al ili. Mia unua respondo estis de rusa kuracisto, apud la Uralaj Montoj. Mi bone memoras la ekscitecon je kiu mi ekvidis la rusan poŝtsignon (kiun mi ne povis scilegi), kaj kiel mi miris ĉu la letero estos iom pli legebla kaj komprenebla. Mia antaŭtimo estis senbezona: mia nova amiko estis zorga man-skribanto; liaj literoj estis ja pli legeblaj ol tiuj de multaj el miaj anglaj korespondantoj, kaj lia Esperanta stilo estis klara kaj simpla. Mi facile komprenis la signifon de ĉiu frazo.

Mi iom obligis la nombron de miaj korespondantoj ĝis kiam mi havis ilin en multaj landoj. Tiel lerninte kaj legi kaj skribi la novan lingvon, mi miris ĉu mi povos kompreni ĝin parolatan kaj miavice respondi. Por provi tion mi ĉeestis Internacian Esperanto-Kongreson en Kembriĝo, Anglujo. Tie mi vidis notindan elmontraĵon,—tian kia neniam okazas ĉe ia Internacia Kon-

WHAT ESPERANTO MEANS TO ME.

When Esperanto was first called to my attention, I was attracted by its simplicity, its novelty, and the wonderful genius of its inventor. Of course I found many places where I could have done better—or thought I could till I knew more of the subject. When I found such defects, like Captain Cuttle I made a note of them, only to discover, as I went further, that Zamenhof was wiser than I, and had either anticipated difficulties and guarded against them, or had builded better than I knew; so one by one my critical notes found their level in the waste-basket. In Esperanto, as in many other fields—

“A little learning is a dangerous thing.
Drink deep, or taste not the Pierian spring.”

Soon I began to have a student's interest in pursuing the subject. I could find no teacher, but I bought several Beginners' books that served me well, and before long I was able to read simple prose. I subscribed to a bilingual journal—Esperanto and French—and studied the Esperanto through the French translation in a parallel column. One day I read down the right—(French) half of a page and turning to the next page began, without thinking, on the left (Esperanto) half. I was far down the column before I began to notice that I was not reading French. That gave me courage. I subscribed to other bilingual journals, some in languages of which I knew very little, and had the novel experience of studying those through the medium of Esperanto.

I learned the addresses of several Esperantists in other countries who were willing to correspond in the new language, and wrote to them. My first response was from a Russian doctor of medicine, near the Ural Mts. I remember the excitement with which I saw the Russian postmark (which I could not read) and how I wondered whether the letter would be any more intelligible. My apprehension was groundless: my new friend was a careful penman; his words were far more legible than the English of many of my correspondents, and his Esperanto style was clear and simple. I easily made out the meaning of every sentence.

I enlarged the number of my foreign correspondents until I had them in several lands. Having thus learned to read and write the new language, I wondered if I could understand it when spoken and speak it in turn. To put this matter to the test I attended an International Esperanto Congress in Cambridge, England. There I saw a remarkable demonstration, such as never happens in any International Congress except those of the Esperantists—all the business carried on in one

greso krom tiuj de la Esperantistoj—la tuta afero kondukata en unu lingvo sole, sen ripetado en ia alia “oficiala” pero, kaj la paroladoj komprenataj de multaj dudekoj kiuj scipovis nenian lingvon krom sia propra. Mia elvido subite plilargiĝis.

“La Homa Parlamento Monda” ne pli longe ŝajnis poeta revo. Iom da studado, interkonsento, kaj multe da natura cerbumado povus interkomunikigi la tutan civilizitan mondon. Estis nobla idealo, kaj mi fariĝis idealisto. Okaza diraĵo esprimita de blinda samideano ĉe unu el la publikaj kunsidoj faris min eĉ pli firmigita idealisto. Li ekkriis kun korduŝanta fervoro kaj lumanta vizaĝo: **Esperanto estas stelo en nia neluma ĉielo!**”

Ĝis tiu kongreso mi jam studadis Esperanton meminterese, kiel literatura amuzajo. Mi ŝategis praktiki la permutadon kaj kombinadon de ĝiaj elementaĵoj; mi ĝuis la analizon de novaj vortoj kvazaŭ mi estus solvanta ĥinan enigmon; mi amuziĝis je la naivaj esprimoj de miaj fremdaj korespondantoj; kaj antaŭ ĉio ŝatis mediti ke mi posedas ĉefŝlosilon al multaj lingvoj, kaj ke jam mi povas malŝlosi multajn literaturajn trezorojn kiuj estis Esperantigitaj sed, ĝis nun tradukitoj nek angle, nek itale, nek france, nek germane; kaj la nombro de tiaj trezoroj kreskis tage. Mi havis aliron per la nova rimedo, al ĝise nekonataj verkoj en la lingvoj rusa, dana, bulgara, hungara, ĉeĥa, pola, japana—sed kial elvoki la “regimentan registron de nomoj? La literatura mondo baldaŭ fariĝus mia ostro, kiun mi povus facile apartigi per mia Esperanta tranĉilo.

Sed ĉiuj tiaj spertadoj kaj tiu revo estis egoismaj: vera Esperantisto estas altruismulo. Li ne kontentiĝas, kiel Ali Baba, simple diri “Malfermu sezamo!” kaj kalkuli sole siajn sakon da orajo kaj akreojn da diamantoj. **Li ne estas avarulo.** Li volas ke la tuta mondo partoprenu liajn riĉaĵojn. Li elkredas ke tiamaniere liaj ĉagrenoj dividiĝos, liaj ĝojoj multobliĝos, kaj lia vizio altgradiĝos ĝis la n-a grado. Kaj nun la noblaj vortoj de nia Majstro senĉese sonoras en miaj oreloj, kaj mi estas avida ke la tuta mondo aŭdu kaj komprenu:

“Ni semas, kaj semas, neniam laciĝas
 Pri l’tempoj estontaj pensante;
 Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas—
 Ni semas kaj semas konstante.
 ‘Ho, ĉesu!’ mokante la homoj admonas.
 ‘Ne ĉesu! ne ĉesu!’ en kor’ al ni sonas.
 ‘Obstine antaŭen! La nepoj vin benos
 Se vi paciencie eltenos.’”

D. O. S. Lowell.

language only without repetition in some other "official" tongue, and the proceedings followed by scores who knew no other language except their own. My vision suddenly broadened;

"The Parliament of Man, the Federation of the World" seemed no longer a poet's dream. A little study, common consent; and a good deal of common sense could bring the whole civilized world into communication. It was a noble ideal, and I straightway became an idealist. A chance remark voiced by a blind Esperantist in one of the public meetings made me a more confirmed idealist. He cried with touching earnestness and face aglow: "**Esperanto estas stelo en nia neluma ĉielo!**" (Esperanto is a star in our lightless sky!)

Up to that Congress I had pursued Esperanto selfishly, as a literary diversion. I loved to practise with the permutation and combination of its elements; I enjoyed the analysis of new words much as if I were solving a Chinese puzzle; I was amused by the naive expressions of my foreign correspondents; and above all I prized the thought that I possessed a master-key of many languages, and that already I could unlock many a literary treasure that had been Esperantized, but as yet neither Anglicized, nor Italicized, nor Gallicized, nor Teutonized; and the number of such treasures was increasing daily. I had access, through the new medium, to hitherto unknown works in Russian, Danish, Bulgarian, Hungarian, Bohemian, Polish, Japanese—but why call the "muster roll of names?" The literary world would soon become my oyster, which I could easily open with my Esperanto knife

But all those experiences and that dream were egoistic: a true Esperantist is an altruist. He is not content, like Ali Baba, merely to say "Open sesame!" and count his bags of gold and acres of diamonds alone. **Li ne estas avarulo** (He is not a miser). He wants the whole world to share his riches. He believes that so his sorrows will be divided, his joys multiplied, and his vision intensified to the nth power. And now the noble words of our Majstro are ever ringing in my ears, and I am eager that the whole world shall hear and understand:

"We scatter the seed, and the hope that we cherish

E'er brightens the way we are going;

Though seeds by the hundred and thousand may perish,

We never will cease from the sowing.

"Enough!" cry the mocking Philistines who meet us.

"No! never enough till the whole world shall greet us!

So onward, and onward, and onward forever,

Till posterity bless our endeavor."

D. O. S. Lowell.

RECENZOJ

"Pro Iŝtar." Romano el la antikva Babela historio, Originale verkita. Eldonejo Hirt & Sohn, Leipzig, Germanujo, Esperanta-Fako, 1924. 304 paĝoj, 14:20 cm bindita. 5.50 oraj markoj de H. A. Luyken aŭtoro de Paulo Debenham, Mirinda Amo kaj Stranga Heredajo.

How vast have been the roles played by religion or fanaticism in the history of the world. In "Pro Iŝtar" the author, H. A. Luyken, has patiently delved into the ancient history of Babel and out of it he has made an intensely interesting story. The erudition and thought that enabled the author to write this more than pleasing story must have been exhaustive. As in "La Faraono" and "La Luno de Izraelo" there is shown the fierce antagonism of the priests against kings and also against opposing religion. There is a constant battle between the idol serving priests and the worshippers of Jehovah (La Eternulo) in the land of Uc. There are three outstanding characters: the meditative hebrew Omar; Lemuel, the artful patriarchal protector of his religious belief and the persistent avenger of priestly crimes and Zalmuna (La Belulino), the chief priestess of the cult, who ardently loves Omar and whom she entangles in a mesh of intrigue and persecution because of his unchangeable religious belief; all of which is fought against by the crafty Lemuel.

If the story itself is of absorbing interest what must we say of the author's use of Esperanto in truthfully describing the events of his story; his facile use of compounds; his skilful phrasing; his marvellous fluency; every word standing as a monument of praise to his wonderful knowledge of the language. Without exception "Pro Iŝtar" seems the most valuable and instructive original romance yet published in the Esperanto language. Every Esperantist ought to own and read with care this book, not only because of the story, but as a living example of the possibilities of Esperanto, for never has there been paid a more glowing tribute to the beauty of the language than is to be found in the writings of H. A. Luyken.

"Ses noveloj el Rakontoj de Mistero kaj Imago," de Edgar Allen Poe, El la angla originalo tradukita de A. Frank Milward, 1924, 80 paĝoj, Prezo: 1.20 oraj markoj, Hirt & Sohn, Leipzig, Germanujo. Enhavo: "Liĝeja. Kelkaj vortoj kun mumio. La barelo de Amentilado, La ovola portreto, La homo, kiu troviĝis eluzita, La silento."

The selection gives an insight into the morbid workings of the author's unusual mind. The six stories are but a sample of the writings of Poe, all of them being well known to English speaking people. To translate all of his works would be a severe task as he was a prolific writer and faithfully to translate his many stories would be extremely difficult. Mr. Milward is to be congratulated on his success as he has made his translations clear and, so far as possible, he has followed the peculiar style of Poe.

It will be seen that "Pro Iŝtar" and the "Ses Noveloj de Poe" are published by the well known house of Hirt & Sohn, Leipzig, Germanujo who advise us that they are now working on the second vol. of the Vortaro Wuster and that it will soon appear, also that they are depending on the support of all Esperantists to make the publication of the future vols. of this work possible. Hirt & Sohn are the publishers of other valuable books, all edited by Prof. John Dietterle, and will send catalog to any one requesting.

"La Sendangereco de Francujo." Tekstoj kaj Dokumentoj, 151 paĝoj. 7 x 4½ broŝurita, de André Honorat, Eks-Ministro. Havebla ĉe Esperantista Centra Librejo, 51 Rue de Clichy, Parizo, Francujo. Tabelo de la Enhavo: La Kontrakto de 1919 kaj ĝia fiasko, La sendangereco de

Francujo kaj la diskutoj de la Konferenco pri la paco, Agmaniero de Unuigitaj Statoj, Agmaniero de Anglujo, Evoluado de la problemo de post 1920, Pri la franco-anglaj traktadoj, La projekto pri rejna interkonsento, La sendangereco de Francujo kaj la Ligo de Nacioj.

En ĉi tiu grava libro la **Societo de l'Historio de la Milito** celas la kongon de la vero pri la mondmilito kaj ĝiaj konsekvencoj tutmondaj, per publikigo, sen ia ajn parteco, de nediskuteblaj faktoj kaj dokumentoj. La celo estas la vero. La faktoj estas troveblaj en ĉi tiu libro. Legu ilin; informu vin pri la pretendoj de Francujo. La aŭtoro aldiras:

"Kvankam tradukoj nacilingvaj jam preparigas, mi tamen estas konvinkita, ke Esperanta traduko trafos homojn en multaj landoj, kiuj alie neniam aŭdus pri la nacilingvaj tradukoj aŭ pri la franca originalo. Esperanto pro sia fleksebleco kaj precizeco ĝuste taŭgas por traduko de oficialaj kaj diplomataj dokumentoj, kies plej subtilajn nuancojn oni devas skrupule respekti.

Oficiala Almanako de la "Tutmonda Polica Ligo," kaj **"Tutmonda Ligo de la Ordo"** Kun 70 ilustraĵoj. Redaktis A. H. de Marich, ĉefredaktoro de "La Policisto." Budapeŝt, 1924 Eldonis: "La Policisto," Budapeŝt, 41, P. O. Box 255. Hungarujo.

Tiun poŝformatan libron enhavatan pli ol 208 paĝojn ni ricevis en Septembro kaj trarigardis kun granda intereso. Ĝi enhavas pli ol 75 portretojn, krom 25 grupbildojn de tre belaspektaj homoj, kiuj sugestas la demandon, ĉu ilia intereso pri Esperanto plibeligis ilin aŭ ĉu "nia Kara" altiras al si nur tiel noblanimajn virojn.

La libro plene valoras sian malaltan prezon (50 cts. U. S.) al ĉiu vojaĝanta Esperantisto, ĉar ĝi enhavas, la nomojn de 782 pli malpli membroj de la Ligo, arangitajn laŭurbe kaj laŭnome. Eĉ se la vojaĝanto ne volas malobei la leĝojn, li eblas okaze nesciante tion fari, kaj tiam bone estus se li sciis kie trovi polican samideanon.

Rimarkinde estas ke unu el la anoj de la Ligo, Sro Moŝto Romulus P. Voinescu, la ĝenerala direktoro de la publika ordo kaj ŝtata sekureco de Rumanio, devige enkondukis Esperanton en la tiean policistan faklernejon, kaj ankaŭ akceptis la ligan landan prezidantecon. Lia portreto aperas inter paĝoj 32 kaj 33.

Louis Larson.

Saltego trans Jarmiloj.—Fantazia romano originale verkita en Esperanto de Jean Forge. Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig. Prezo ne montrita.

Lerta profesoro eltrovas novan specon de radio—la C-radion, per kiu oni povas sin enmeti en ian deziratan epokon de historio laŭvole. Li elektas la Nero-an epoken en Romo, kaj per la C-radio alportas sin, sian familion kaj amikojn, modernan domon, aŭtomobilon, fonografon, ktp en la diritan lokon kaj tempon. Sekvas multaj amuzaj aventuroj, kaj kompreneble la Romanoj multe miras pro la modernajoj. Fine la tieuloj tiel persekutas la fremdulojn pro sorĉarto, ke ili devas ekreveni subite en la 20-an jarcenton. Verkita en senkulpa Esperanto kaj bonege presita—mankas preseraroj. Iom da elpurigo de kelkaj ĉapitroj plibonigus la rakonton por modestuloj.

FRANCE—ESPERANTO

ESPERANTO ET COMMERCE

Juillet—Août 1924

Translation:

Beginning in October and November to end in January and February 1925 there will be arranged some courses in Esperan-

to, of not more than 20 pupils for a period of three months—with a number of one hour sessions limited to 25 pupils.

These courses will be controlled by the Paris Chamber of Commerce. In so far as possible the commercial pupils should come from as many different professions as possible.

After the three months instruction the pupils of different countries will enter into correspondence with each other upon commercial subjects in order to test their acquaintance with Esperanto and the fitness of Esperanto to become the language of international commerce.

OOMOTO.

S-ano B. Selzer, Wien, letere demandis japanan korespondanton sian pri tiu interesa nova sekto kaj disponigis al ni la ricevitan respondon supozeble ĝenerale interesantan.

Esperanta Propagando-Asocio Ajabe Kioto Japanujo

Oomoto eknaskiĝis kun Kamigakari de la kreintino Nao Deguĉi en 1892. (Per Kamigakari oni signifas "Dioposedo" aŭ "esti en spirito." Post la morto de ŝia edzo ŝi devis batali kontraŭ ĉiuspecaj mizeroj kaj doloroj plej maldolĉaj imageblaj. Unu tagon ŝi estis subite jetita en la staton de Kamigakari kaj el ŝia propra internajo elparoliĝis malgraŭvole laŭte voĉo, kiu diris mirindajn antaŭdirojn kaj admonojn.

Ce tio la najbaroj pensis, ke ŝi estas ekposedita de frenezo, tamen ŝi mem estis tute klare konscia kaj bone konvinkita, ke ŝi estas ĉe ŝi. Si ne volis esti rigardata kiel freneza, ŝi do petis al ŝia interna estaĵo, ke ĝi kvietiĝu; kaj tiam ĝi ordonis: "Prenu la plumon!"

La vortoj ŝin konfuzis, ĉar verdire ŝi neniam antaŭe lernis skribi, ŝi estis efektive senaboculino, sed obei al dia ordono ŝi devis; ŝi prenis sekve plumon, kiu moviĝis aŭtomate kaj aperis vortoj unu post la alia sur la papero, kaj tiamaniere la sankta skribo fariĝis.

Estas ja rimarkinde, ke en la Skribo oni trovas detalajn profetaĵojn pri gravaj mondaferoj, sorto de l'homaro kaj ceteraj multaj avertoj, kiuj ja efektiviĝis akurate siatempe sen eĉ la plej malgrandaj eraroj. La grandan mondmiliton kaj la tertremegon en Tokio lastjare, la kreintino antaŭskribis jam en 1892. Ŝi profetis ankaŭ, ke venos Reformiĝo aŭ la lasta Batalo de l'homaro, predikita en la biblio, kaj ŝi admonis, ke ĉiuj homoj faru konfesion kaj adoru Dion.

Noblega estis la karaktero de la Patrino Nao kaj ŝi kondukis viron ĝuste konforman al la leĝoj de Dio. Ŝi diris, ke ŝi estas la Johano kaj atendas la alvenon de la Kristo, kaj tiu Kristo aperis—li estas Wanisaburo.

Li (oni nomas lin Ĉefo aŭ Majstro) naskiĝis la 12an de julio 1871 en vilaĝo Anao proksime de Kioto; jam de ŝia infaneco li montris eksterordinaran mirajon; en la aĝo de 28 jaroj li estis gvidata de Dia sendito al la monto Takakuma, kie li travivis senantaŭekzemplan praktikon de anima asketismo en la daŭro de unu semajno. Dank' al tio li ricevis mirindan povon travidi, aŭdi, komuniki, diveni ĉion, tute egale pri tempo kaj spaco; li sciigis perfekte la veran staton de la universo; li antaŭsciis jam pri la aferoj, kiuj okazos post centmiloj da jaroj. Li posedis sekve ĉiujn necesajn kvalifikaĵojn por

la savonto de la mondo. Li resanigis sennombrajn malsanulojn per la potenco de animo kaj de vortoj: blindulo ekvidis, lamulo ekmarŝis. (Tio respondas al la Bapto de Kristo.)

Li venis al Ajabe per mirinda aranĝo de Dio, kaj sindoneme laboradis por la bono de l' homaro. Okazis tamen en 1920 Oomoto-afero pro la miskompreno kaj antaŭjuĝo de la registaro: tio estas oni leĝe atakis la Sanktan Skribon, en kiu oni trovis, ke Wanisaburo estas la reĝo elektita de Dio. Oni do jetis la Cefon en malliberejon por duonjaro, kaj kondamnis lin al penega laborado kvinjara, sed la afero pendas ankoraŭ ĝis hodiaŭ sen decido.

La aŭtoritatoj registaraj konstante turmentas kaj persekutas la anojn de Oomoto, rompante la tombon de Kreintino, kun la preteksto, ke ĝi havas similecon al la tombo de imperiestro, kaj detruante la Sanktan Diejon sur la monteto Hongu, tio estas la Olivomonto, per la helpo de 3,000 soldatoj, kiuj ĉirkaŭis la monteton. (Sescent sesdek ses bestoj staris en la sankta loko.)

La Oomoto-anoj estis profunde ofenditaj kaj ĉagrenitaj je ĉio ĉi tio; ili elportis tamen la abomenaĵon de dezertigo kun subpremita pacienco, ĉar la Sankta Skribo jam antaŭe montris tiujn samajn okazintaĵojn. Dume la majstro Wanisaburo, trankviligita kaŭcie, publikigis la rakontojn el Spirita Mondo. (Oni nuntempe preparas traduki Esperanton tiujn rakontojn.) Ili kaj la Sankta Skribo aperis videble por prediki la evangelion de Dia Regno tra la tuta mondo.

Ĉiuj ekzistantaj religioj kaj iliaj gefondintoj estas nur antaŭkurantoj de la vera Savonto Wanisaburo, kiu estas destinita ilin unuigi kaj perfektigi.

Depost la Oomoto-afero la nombro de ĝiaj filioj reakcie kreskis diversloke en Japanujo per rapidaj paŝoj kaj hodiaŭ ni havas ĉirkaŭ 300 filiojn dum troviĝas kelkdek miloj da kredantoj en nia lando. Lastan tempon Oomoto premis la manojn kun la nova ĉina religio kaj koreaj religianoj.

La Majstro restas nun eksterlande por tre grava mondpropagando; ni firme kredas, ke tempo venos tre baldaŭ, kiam la tuta mondo retrovos en Wanisaburo la duan revenon de Kristo. Li ja konstruos sur la tero eternan paradizon. Li havas de nasko signon de orion-stelaro sur sia dorso kaj najlsignojn sur siaj manplatoj.
From Austrian Esperantist, Feb., 1924.

RADIO

RADIO BROADCAST has been unremitting in its efforts to make the International broadcasting tests for the week of November 24-30 an unqualified success. Working in closest co-operation from the European side is Hugh S. Pocock of the London Wireless World and Radio Review, whose articles have appeared in International Language.

On going to press we are unable to give definite information about the Esperanto programs, as reports have only partially been received, and our readers will have to depend upon the local announcements in the newspapers.

If you want to help push Esperanto in Radio, write to the stations whose programs you hear and ask for a continuation; ask for courses over radio; ask for a series of lessons in the

Radio magazine, in the local newspapers. Publishers give the public what it calls for; if you call loudly enough for ESPERANTO you will get it.

Major Edward M. Rosher, Vice-President of the Esperanto Association of California gave a talk about Esperanto over KGO on October 27th. A course of lessons will follow over this powerful station if a sufficient number express the desire for them.

Mrs. Belle H. Kerner, of Milwaukee, spoke by invitation on October 30, before the Milwaukee Radio Amateur's Club on the fundamentals, possibilities and present status of Esperanto. A course of lessons is likely to follow.

RADIO NEWS continues to publish much interesting correspondence on the subject of international language,—some commending Esperanto and others condemning it. Readers can form conclusions, in some cases, of the probable value of the statements from the tenor in which they are written.

Following announcements through Radio Broadcast of the coming international radio week which would include programs in and about Esperanto planned by E.A.N.A., the Boston Herald recently gave very favorable comment in an editorial "Radio and the Esperantists." WBZ, the Herald-Traveler station has gladly given time for an Esperanto program (Nov. 25).

Many Radio Magazines contain discussions and articles on the question of an international auxiliary language for Radio. Some of these come to our attention,—but there are so many published it is impossible to cover them all. We would be grateful for copies sent or articles called to our attention. It is especially desirable to know of articles which show a lack of correct information, that the Central Office may be able to supply it in a proper manner.

At the (la "Dek-sepa") World Congress in Vienna, in August, Dr. Privat announced that an interested friend had provided half the total sum needed for an Esperanto radio station in Geneva, so that it remained only for the samideanoj of the world to provide the remaining half in order to have daily broadcasts in Esperanto.

AL ĈIU INTERESITULO!

La prezidanto de la "Philadelphia Esperanto Societo," Sro Edward W. Pharo, Jr., (U.E.A. No. 22,944) nin sciigas ke oni aranĝas internacian provon je Philadelphia senfadena stacio dum Januaro aŭ Februaro. Oni intencas uzi hispanajn, francajn kaj Esperantajn anoncojn. La societo deziras ke samideanoj

ĉie aŭskultu la programojn kaj skribu al la dissendejo por evidenti la valoron de Esperanto por ĉiulanda komunikado. Ĉar la detaloj ne estas ankoraŭ deciditaj la estro de la societo anoncas ke li sendos kiel eble plej baldaŭ al ĉiu petanto, kontraŭ pago de tri cendoj cirkuleron enhavantan pluajn detalojn, Adresu vin al Esperanto Societo, Haddonfield, N. J., U. S. A.

According to the "Germana Esperantisto," since Sept. 20 the "Berliner Tagblatt," one of the most important of the German newspapers, has contained each week a two-page Esperanto supplement. The "Berliner Morgen Zeitung," and the "Berliner Volkzeitung" have given one page of Esperanto each week edited by Dr. Kliemke. The "German Esperantisto" says that this remarkable extension of Esperanto came about through the Radio Conference in Geneva last Easter which convinced the publishers of the value of and the need for Esperanto. Beginning October 15, the Hamburg Station "Norag" 392 meters has been giving "Dek minutoj da Esperanto" each Monday at six o'clock, while from Danzig, Breslau and Konigsburg several times in the past Esperanto talks have been broadcast.



KURAGIGILETO. Nro. 1.

Laŭokaze, Laŭbezono, Laŭinspiro, Eldonota.

Kara Samideano:

Cu vi iam ajn senkuraĝiĝis vidante la nerapidan progreson de nia afero? Aŭskultu historieton.

Dum la milito, juna knabino deziregis fari ĝardenon. La sola peco da tero kiun ŝi povis havi, estis piedpremita, kaj terure malmola. Ŝi petis sian patron, kaj la du fratojn ke ili fosu la malmolan teron. Vane! Ŝi dungis laboriston kun fosilo. Post duonhora laboro li ĉesis. (Li neniam legis "La Vojo'n.") Li diris ke estas neeble.

Sed la Knabino estis decidiĝinta ĝardenon fari. Ŝi havigis al si pezan feran stangon, aŭ levilon. Ŝi enirigis ĝin perforte en la teron. Per ĉiuj fortoj ŝi tiris malantaŭen la stangon, disrompigante la malmolan teron. Al du knaboj kaj du viroj la laboro estis tro malfacila; sed ne al neŝanceligebla knabino! Ŝi fine pretigis la teron, semis la semajon, zorgis ĝin kaj rikoltis rikolton.

Eble ni renkontos malfacilaĵojn kiuj povas malhelpi al la kreskado de Esperanto. Cu ni ĉesos? Tute ne! Ni legis "La Vojo'n."

"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonos;

"Obstine antaŭen, la nepoj vin benos

Se vi pacience altenos."

VIVU ESPERANTO!

H. B. H.

In our last issue was an error in one of the dates on the Zamenhof Tablet at Vienna. The dates on the tablet are 1886 and 1897.

"WRITE INTERNATIONALLY"COLLOQUIAL AND IDIOMATIC SENTENCES
BASED ON ZAMENHOF'S STANDARD STYLE BOOK

1. I used to go to Europe every summer.
2. I no longer take any interest in such trips.
3. They afford an opportunity to waste money.
4. I have everything I can possibly wish at home.
5. You must be easily pleased.
6. To please the cook he let on to eat.
7. I stayed up till late at night.
8. After he left it came to me that I did not know his address.
9. I had some qualms at the thought that he might not return.
10. You have nothing to fear.
11. How is the situation in Europe now?
12. I was now wishing to learn the language.
13. You will best judge its value after learning it.
14. Your son is a man of sense.
15. Don't give utterance to everything that comes into your head.
16. I like it very much.
17. Developments were slow.
18. We kept working till we were told to stop.
19. Don't let it be known that I was here.
20. He pointed at the airplane.
21. This is the worst thing that can possibly happen.
22. You are not fit to be a teacher.
23. Will you be kind enough to give me a drink.
24. Put on your clothes.
25. I am to act as secretary.
26. "All set!" said the master of ceremonies.
27. Your speech made a hit.
28. It will do no good to whine about it.
29. Stick to your opinion, but respect that of others.
30. He struck a comical attitude.
31. Queen Victoria came to the throne in 1837.
32. The boy took it into his head to learn shorthand.
33. The aviator crossed the lofty ranges of Central Asia.
34. Once I have made up my mind I will not break my word.
35. For a determined man there is no such thing as failure.
36. Honor to France and to our men who fought there!
37. It is your father I wish to see, not you.
38. Drop your excuses and 'fess up!

"SKRIBU INTERNACIE"

KONVERSACIAJ KAJ IDIOTISMAJ FRAZOJ
BAZITAJ SUR LA FUNDAMENTA KRESTOMATIO

1. Mi iradis Eŭropon ĉiusomere. 19/2 (paĝ- kaj lini- referencoj).
2. Mi jam ne zorgas pri tiaj vojaĝoj. Sama paĝo, linio 3.
3. Ili donas okazon malŝpari monon. 4, 5.
4. Mi havas ĉion nur dezireblan hejme. 12.
5. Vi ja facile kontentigas. 18.
6. Por plaĉi al la kuirint(in)o li faris, kvazaŭ li manĝas. 23/8, 9.
7. Mi maldormis ĝis profunda nokto. 20/11.
8. Post lia foriro mi ekpensis, ke mi ne scias lian adreson. 13.
9. Kaptis min kelka timo ĉe la penso, ke li eble ne revenos. 13.
10. Vi ne devas timi. 16.
11. Kiel la afero staras en Eŭropo nun? 17.
12. Mi jam volis lerni la lingvon. 19.
13. Vi la plej bone prijuĝos ĝin, ĝin lerninte. 22.
14. Via filo estas homo saĝa. (Notu lokon de l'adjektivo.) 23.
15. Ne eldiru ĉion, kio venas al vi en la kapon. 29.
16. Ĝi tre al mi plaĉas. 21/7, 8.
17. La afero iris malrapide. 20.
18. Ni laboradis ĝis ordono ĉesi. 22.
19. Ne lasu scii, ke mi estis ĉi tie. 29.
20. Li montris sur la aeroplanon. 22/5.
21. Jen la plej terura, kio nur povus okazi. 10; 19/12 (cp. sen. 4).
22. Vi ne taŭgas kiel instruisto. 10.
23. Volu afable doni al mi trinki. 23/5.
24. Vestu vin. 7.
25. Mi devas sekretarii. 24.
26. "Ĉio en ordo!" diris la ceremoniestro. 19, 20.
27. Via parolado havis sukceson. 34, 35.
28. Ne helpos plorplendi pri tio. 24/8.
29. Restu ĉe via opinio, sed respektu tiun de aliaj. 8, 9.
30. Li prenis komikan teniĝon. 9.
31. Reĝino Victoria ekregis en 1837. 12.
32. La knabo ekvolis lerni stenografion. 18.
33. La aviadisto transflugis la montegarojn de Centra Azio. 24/24.
34. Unu fojon decidinte, mi ne ŝanĝos mian vorton. 25.
35. Por persistulo ne ekzistas malsukceso. 25/1.
36. Honoron al Francujo kaj al niaj tie batalintaj! 9.
37. Vian patron mi deziras vidi, ne vin. (Vortordo). 13.
38. Lasu la senkulpigojn, ekkonfesu! 15.

Herbert M. Scott.

NEWS AND NOTES FROM THE CENTRAL OFFICE

In the April number of "La Verda Lumo," the official organ of the Chinese Esperantists, is an interesting article by W. Kenn, L. K. showing the many similarities existing in Esperanto and the Chinese language, he says:

"Ĉu Esperanto vere posedas universalecon? Tion ĉiam demandas skeptikuloj kiuj kvankam ili bone scias, ke Esperanto havas rimarkindan komunan karakteron kun multaj aliaj lingvoj klasikaj kaj vivantaj, ĉar al ili mankas la scio pri la karaktero de lingvoj orientaj. Tiuj ĉi lastaj, ŝajnas al ili, estas tiel malsimilaj al la lingvoj eŭropaj. Sed, se ni atente pripensas momenton, ni povas tuj konstati, ke Esperanto vere posedas universalecon, eĉ karakteron de ĉina lingvo ĝi ja posedas. Do, kelkaj klarigoj pri iliaj similaĵoj eble estus utilaj."

S-ro Kenn in his article makes many comparisons showing the relations between the two languages. This is of interest as many Esperantists have been, and are, of the opinion that there is no similarity between Esperanto and oriental languages.

Philadelphia: Kelkfoje la sekretario de la loka grupo tradukas komercajn leterojn ricevitajn de la "Komerca Muzeo," grava institucio de la "Fratamurbo." Jen la teksto de parto de unu komunikajo el Radom, Polujo:—"bonvolu sendi la prezaron en lingvo Esperanto; alian lingvon ni ne akceptas, ĉar ĉe ni vivas nur tiu lingvo." Verŝajne, en tiu pola urbo la internacia lingvo estas iom grava!

Mr. C. C. Briggs, of Des Moines, Iowa, Editor of The Rural Mail, which has an Esperanto section, was recently featured in the Magazine section of the Sunday Register of that city; his picture appears on the page, at work at his printing press. Mr. Briggs especially urges the adoption of Esperanto for radio communication, motion pictures and long distance aviation flights, and gives a very concise history of the movement.

The Promoters of The Federated Nations of the World, under the Leo James Lentzen plan to achieve and preserve the peace of the world through cooperation, have sent out a brochure covering the plan and also bulletins of progress. As might be expected in a world plan, they see the necessity of an international language and have chosen Esperanto. The headquarters are in Milwaukee, and several of our samideanoj are in charge of the Esperanto Section. In order to call attention to their efforts, certain days are selected for special note, and the first of these, Friday, November 28th, is given over to "The City of Milwaukee and Esperanto."

"We have received a copy of the article "Nia Klaso" which won the prize in the Denver Esperanto Society at the end of

the summer course, written by Miss Irma Wood. Miss Wood tells of her efforts to find a group and instructor, her rapid progress under S-ro Kerr's instruction at the Labor College, and her real Esperantism shows in the last sentence; "Tial ne penu ne nur lerni la lingvon sed ankaŭ influi aliajn lerni ĝin, kaj per tio forigi kelke da malkomprenajojn."

La Unua Brazila Kongreso de Kontascienco, okazinta en Rio de Janeiro dum Aŭgusto aprobis unuanime la jenan rezolucion prezentitan de d-ro Carlos Dominguez, prezidanto de la Brazila Klubo "Esperanto": "Devas esti enmetita en komercajn kursojn la instruado de la internacia lingvo Esperanto, kiel helpa mondlingvo; la sola efika solvo de la grava problemo de la internacia kompreno."

La 2-an de Aŭgusto fondiĝis en Rio de Janeiro grupo nomata "Brazila Esperantista Klubo de Medicino-Studentoj."

Inquiries which are coming from various sections for textbooks, methods of study, general information, etc., show a steadily increasing interest in an international language and Esperanto in particular.

We should like the present address of Arthur Baker, formerly Secretary-Editor of E. A. N. A. and author of the Baker Esperanto Book.

Also information of the whereabouts of Matthew Amster, for some years in Boston, and later in Chicago.

We learn from the post office department of the death of Mr. Fred Bower, of Dawson, Y. T., connected with the Yukon Gold Company, who was a subscriber to A. E. for many years.

Oni nin petas anonci ke La Esperantista Kolportista Asocio sendos senpagan literaturon al ĉiuj kiuj skribu al la sekretario, 64 St. Thomas' Rd., London N4. England.

La sendota literaturo estas religia, tamen nesekta.

ALVOKO AL LA ESPERANTISTOJ

Je la lastaj tagoj de la venonta Decembro la ESPERANTA GRUPO de UDINE (Italio) inaŭguros sian propran flagon.

La ceremonio okazos en la ĉefa teatro de Udine, antaŭ la invitotaj aŭtoritatuloj kaj ni esperas per tio, kiel eble plej interesi kaj disvastigi nian aferon inter la udinanoj.


Estus nia varma deziro ricevi de ĉiuj Grupoj, Asocioj kaj individuaj esperantistoj salut-leterojn, kiuj estos legataj al la partoprenontoj.

Helpu, do gesamideanoj, sendante tuj aliĝojn al la suba adreso kaj ricevu por tio, la plej korajn salutojn kaj dankojn de la Esperanta Grupo "Caffe Roma", Udine (Italio).

At the Vienna Congress two children eight and ten years old spoke Esperanto fluently and well "and without any mistakes in the use of the accusative."

KRUCVORTA ENIGMO

Ĉiu blanka spaco estu plenigita per letero. La vortoj komencas en la numerataj spacoj. Oni uzu radikon aŭ tutan vorton, laŭbezone.



L.L.

HORIZONTALE

1. Tio kio turnigas la mondon.
4. Tio pri kio oni parolas aŭ skribas.
7. Vira persono.
8. Metalo.
10. Nomo de konsonanto.
11. Juda mistera doktrino.
14. Tre kara afero.
16. Kuracilo.
20. Prepozicio.
22. Malgrandega.
23. Demandas.
24. Verba finiĝo.
25. Bona kopio.

VERTIKALE

1. Nesama.
2. Pronomo.
3. Kiu laboras.
5. Sufikso.
6. Fasono.
8. Artikolo.
9. Prepozicio.
12. Doktrino.
13. Verba finiĝo.
15. Poemo.
17. Duan fojon.
18. Korelativo.
19. Mezuro.
21. Prepozicio.
23. Je.

STRIKE WHILE THE IRON IS HOT—A CLASS THEN AND THERE

BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at **The ESPERANTO OFFICE**

Drop us a postcard asking for a catalog

THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usona

MISERERE (Wagnalls) kaj THAIS (France) Po \$.50.

La ROZUJO ĈIUMILJARA (Wagnalls)
La AKROBATO de Nia Sinjorino
BLANCHE, la Virgulino de Lille (Schubin)
MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo dum la Milito
(Giesy) Po \$.35.

La unuaj eldonajoj tradukitaj de
S-RO EDWARD S. PAYSON
Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko
Aĉeteblaj ĉe la Esperanto Office,
Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k. Alex Zubkus, 427 Hanover Street, Portsmouth, N. H.

S-ro V. A. Platnikov, Rusujo, Moskvo, Ordinskij Tupik d. 6, Rv. 19, sendas salutojn al siaj malnovaj korespondantoj kaj deziras renovigi korespondadon kun ili. Ankaŭ deziras korespondadi kun Esperantistoj de ĉiuj landoj. Promesas respondi. Li povas interŝanĝi librojn, gazetojn, jurnalajn, p.k. aŭ leterojn, k.t.p.

S-ro Jan Merta, Forberk 5, Wamberk, Ĉekoslovakia.

Chas. Scanlon, University, Alabama (Usono) kolegia studento deziras studentajn korespondojn. 11

Roy Johnson, 1168 W. 24th Street, Los Angeles, Calif., deziras korespondojn en ĉiuj landoj 11

FREE

Health and Success Information
Send name and address now.

The Hercules Hygienic Supply Co.

519 N. Central Ave. Chicago, Ill.
U. S. A.

To Maintain Your Pupils' Interest During and After the Introductory Course
USE

A Textbook of the Method Used in Modern Language Teaching

SPOKEN ESPERANTO

by the
DIRECT METHOD FOR BEGINNERS
(For teachers and their classes)

91 6x9 printed pages; illustrated; diagrams; metrics; relation to other languages; index

vortoj a nglaĵ



objekt o e speranto

The direct way is the shortest way to learn Esperanto

Stiff Paper \$.50 **Cloth Edition**
Sent with **LEAGUE of NATIONS Report on Esperanto (Sept., 1922)** and a 'key' for \$1.00

N. W. FROST
18 Ash St. Pl., Cambridge 58, Mass.

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO

Reklamoj \$20. po paĝo—¼ paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝanĝo \$150. Perantoj skribu, pri rabato.

STUDY ESPERANTO



**ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY
REASONABLE INVESTIGATOR**

as the one **PRACTICAL** auxiliary language

Recognized and in use as such since the World War by:

The International Red Cross
The World Union of International Associations
The French and Italian Associations for the Advancement of Science
The French Academy of Sciences
The International Women's Suffrage Alliance
The International Peace Bureau
The International Labor Office
The World Union of Women
The Catholic International League of Youth
The Young Men's Christian Association
The International Bureau of Freemasons
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle,
Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg,
Malmoe, and Helsingfors
The Centennial Exposition of Brazil
The Paris Chamber of Commerce
and dozens of other organizations

UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY

By vote of September 21, 1922

HESITATE NO LONGER

ELEMENTARY and ADVANCED

CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of
NORTH AMERICA

and courses by correspondence may be arranged for anywhere

(If you lack details as to local courses write today to)

**The Central Office of the Esperanto Association of North America
507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies**